

## EPILOGO

### DE LA AŬTORO JE PETO DE LA ELDONISTO

#### MIA VIVO KAJ VERKADO

Mi naskiĝis en la jaro 1897 en la hungara urbeto Gyula. Mia patro havis juristan diplomon kaj estis oficisto en la financa direkcio de la ŝtato. En sia posteno li estis plurfoje transloĝigita. Tiel mi vizitis lernejon komence en Alsókubin (nun Dolny Kubin, Ĉeĥoslovakio), poste, mezlernejon en Lugos (nun Lugoj, Rumanio), kaj mi devis ekkoni la naciajn antagonismojn, kiujn mi neniam povis kompreni kaj konsideris jam dekomence sensenca malfaciligigo de la vivo. Tiuj spertoj donis al mi la unuajn instigojn fariĝi esperantisto. La lingvon mi komencis lerni en mia dekkvara vivjaro. En tiu ĉi lingva movado mi vidis la enkorpiĝon de miaj ĉiam pli kaj pli reliefigantaj homaranismaj ideoj.

Foje Paĉjo (Julio Baghy) demandis pri kiam mi esperantistiĝis. Mi respondis: „Mi estas esperantisto ekde mia naskiĝo.” Kaj tiam ni ambaŭ konstatis, ke esti esperantisto havas pli altan, pli riĉan sencon, ol esti adepto de internacia lingvo: ĝi estas destino, misio.

En 1915 mi venis Budapeŝton, al la politeĥniko, kie mi perkursis la maŝinĝenieran fakultaton. Post la akiro de la diplomo, mi fariĝis inĝeniero de la fabriko MÁVAG, kiu havis diversajn pezindustriajn uzinojn kun 30.000 laboristoj, kaj tie mi okupiĝis per maŝinplanado.

La suferoj de la mondo dum la unua mondmilito malesperigis kaj enpensigis min pri la sorto de la homaro. Post la milito, la ekfunkcio de la Ligo de la Nacioj ŝajnis doni iaspecan esperon al pli sunluma estonto, sed post kelkaj jaroj la ekonomia mondkrizo kaj la ĉiam pli videbla ekĝermo de la dua mondmilito konvinkis min pri la senespera stato de la homaro.

En mia animo ĉiam pli lumiĝis la praveco de la verko de Madách: *La Tragedio de la Homo*, kies rezulto estas, ke la homo senĉese luktas kaj esperas pli bonan estonton, kiu tamen neniam alvenas. La homaro ĉiam suferigos sin mem.

Same lumiĝis al mi la grandioza idea senco de *Gulliver* de Swift: la homa animo havas internan, strukturan difekton, kiu malebligas al ni vivi perfektan vivon.

En la jaro 1931 Péter Illéssy, kiu estis eminenta pentrartisto kaj klarmensa filozofo, diris al mi:

— Mi havas ideon pri pentraĵo: supre sidas Budho laŭ lotus-pozo, kaj, levante sian montrofringron, instruas. Apude Jesuo predikas per etenditaj brakoj. En la centra parto de la bildo kuŝas Sfinkso, duone kovrita per polvo, kaj sube malkreskanta Luno. Kian titolon vi proponas por la bildo?

Post iom da medito mi diris:

— Estu la titolo: *Vane*.

En la sama jaro mi provis en beletristika formo priskribi miajn vivspertojn. Mi verkis trilogian romanon kun la titolo: *Vane*. La tri partoj okazis en tri epokoj: en la pasinto, la estanto kaj la estonto. La roludantoj estis la samaj homoj, la samaj sociaj tipoj, nur

en aliaj medioj, konvenaj al la epokoj. Iliaj sortoj estis ankaŭ la samaj: la entuziasmo de la heroo estas sufo-kata kaj la mondo plurotacias laŭ la eterna, monotona sameco. La devizoj, la konvencioj estas aliaj, sed esence nenio sangiĝas.

Tiu mia trilogio ne aperis. Kiam mi finis la romanon, ĝi jam ne kontentigis min, ĉar dum la verkado mi venis al pli kompletaj rezultoj de mia idearo.

Do, en 1935 mi komencis verki novan romanon. Tiu estis *Vojaĝo al Kazohinio* (hungara titolo: *Utazás Kazohiniába*). Ĝi estis gulivera aventurromano.

La romanon — ĝuste pro ĝia tuthomara tendenco — mi intencis eldonigi esperantlingve. La tiama budapeŝta eldonejo Literatura Mondo akceptis la eldonon, kiun la intertempe plifortiginta hitlerismo malebligis. Literatura Mondo ĉesigis sian funkciadon.

Tiam mi devis pretigi hungaran eldonon.

En 1941 Hungario ankoraŭ estis ekster la milita kirligo, kaj tiam mi sukcesis aperigi la libron hungarlingve, sed nur en formo kripligita per la milita cen-zuro, kiu strekis la plej bonajn partojn. Malgraŭ la kripligo la sukceso superis miajn esperojn kaj la libro baldaŭ elĉerpigis, sed dua eldono eblis nur post la milito, en 1946. Ankaŭ tiu eldono rapide elĉerpigis, sed la tempoj denove malheliĝis kaj tria eldono povis okazi nur en 1957.

Ankaŭ la esperantan tekston mi transigis al SAT en 1939, sed la interveninta milito ankaŭ tiun eldonon malhelpis, kaj fine, en 1958, aperis la esperanta eldono, do la originala.

Tiun mian verkon ne mi devas prezenti al la esperantista legantaro. Despli, ĉar al ĝi verkis brilan en-

kondukon Kalocsay, prilumantan la tendencon de la romano: la teĥniko tute aliformigis nian medion, sed ne povis aliformigi niajn instinktojn, kiuj ankaŭ nun konformas al la pramedio, al la iama besta vivo, al la stato de la „batalo por la vivo”, anstataŭ la nun jam aktuala „paco por la vivo”. Nun ni estas en grava krizo. Se ni ne povas niajn instinktojn akomodi al nia maŝinigita medio – kiel en la romano la hinoj –, ni pli aŭ malpli frue ekstermos nin mem pere de la maŝinoj.

Ne flata, eĉ ne agrabla aŭguraĵo, sed la tempoj ĉiam pli kaj pli pravigas miajn principojn, elpensitajn en 1935.

Ĉu pesimista mondvido? Jes. Sed ĝi montras la vojon: ni devas almenaŭ bridi niajn instinktojn, ekkoni ilin kaj teni la tigron en kaĝo. Ni ne povas nian naturon aliformigi, sed la vekigo de la konscio eble povus regi ĝin. Kaj la celo de la libro estis nur tiu ĉi.

Kiel preskaŭ ĉiun simbolan verkon, ankaŭ *Kazohinion* miskomprenis multaj legantoj. Tial mi devas rimarkigi, ke la senco de la nuna titolnovelo, *Maŝinmondo*, estas preskaŭ la sama: la evoluo de la teĥniko estas nehaltigebla procezo, kiun marŝigas la arma konkuro nerezistebla al la ŝtupo, kiam la homaro devas cedi al la postuloj de sia nova medio aŭ pere.

Sed tiu ĉi nova medio postulas novan moraron, novan estetikon, eĉ instinktaron, kiuj estas ankoraŭ fremdaj, neelteneblaj al ni, malkonvenaj al nia nuna, naturdonita organismo.

Ni trafis en gravan dilemon, kiu ĉiam pli kaj pli akriĝas kaj tamen ni povas nek akomodiĝi nek haltigi la procezon. Ĝi kuntrenas nin paŝon post paŝo al la abismo.

Alia celo de la novelo estas reliefigi, ke ĉiu procezo senlime evoluanta fine transiras al sia propra antipodo, kiel du kontraŭdirektaj arkoj de cirklo. Ĉiokaze la senlime perfektiganta materio renkontas sian antipodon: la pure senmaterian mondon de la *ultra-substancoj*.

Mi devas ankoraŭ rimarkigi, ke la novelon pri la *kompofono* mi verkis en januaro 1957, do, en tempo, kiam ankoraŭ ne okazis eksperimentoj por konstrui kompofonmaŝinon. Kelkajn jarojn poste ni legis artikolojn pri tiaspecaj esploroj.

La unuan esperantlingvan artikolon mi skribis en 1932: ĝin EMBA, la antaŭ nelonge mortinta poeto, forsendis kaj aperigis en „Sennaciulo”. Nur post la dua mondmilito mi povis verki por la esperanta gazetaro. Miaj rakontoj aperis en „Norda Prismo”, „Revuo Esperanto”, „La nica literatura revuo”, „Belarto”, „Monda Kulturo”, „Progreso” ktp.

Apartan dankon mi devas diri al miaj eminentaj amikoj s-roj Albault, Auld, Bartelmes, Lagrange, Régulo Pérez, Sadler, Szilágyi, Waringhien, kies helpo kaj komprenema apogo donis al mi netakseblan instigon en mia verkado.

Kaj fine, sed ne laste, mi devas danki al Kalocsay ne nur lian helpon, sed precipe la brilan tradukon de la rakonto *Vincenzo*, per kiu li montris al mi la vojon, kiel mi devus verki, se mi estus ne nur verkisto, sed ankaŭ majstro de nia lingvo. Nome, tiun tradukon mi verkis hungare kaj nur poste esperantigis. La rakonto ekplaĉis al Kalocsay, kaj ankaŭ li ĝin tradukis, nekompareble pli bone.

# BIBLIOGRAFIO

- Mallongigoj: *HV* = *Hungara Vivo*  
*Inlr* = *la nica literatura revuo*  
*MK* = *Monda Kulturo*  
*NP* = *Norda Prismo*  
*SR* = *Sennacieca Revuo*

El la eroj listigitaj en sekcio A, la kompilinto vidis ĉion, almenaŭ en fotokopio, krom n-roj 1,44 kaj 52. N-ro 4 aperis unue en *La Progreso*, due en *Esperanto en Slovakio*, sed precizajn indikojn la kompilinto ne havas.

La unua publikigita verko de Szathmári aperis en *Sennaciulo* en 1934. La kompilinto ne vidis ĝin. Io de Szathmári ŝajné aperis en *La Praktiko*, sed ankaŭ tion la kompilinto malsukcesis trovi.

Oni bv. noti, ke en sekcio Ĉ, nomoj sekvas la normalan hungaran vicordon (familia-persona).

## A. Verkoj de Szathmári en Esperanto.

- 1956: 1. Perfekta civitano. *NP*, nov.  
1957: 2. Verdikto. *NP* 5, p. 239-242.  
3. Vojaĝo en Kazohinio (fragmento).  
*SR* 85, p. 52-56.  
1958: 4. Diskuto pri Esperanto. *Esperanto*,  
junio, p. 95-96.  
5. *Vojaĝo al Kazohinio*. SAT, Paris. 317p.  
1960: 6. Brakhorloĝo. *Inlr*, maj.-jun., p. 186-187.  
7. Klarigoj al „Vojaĝo al Kazohinio”.  
*SR* 88, p. 47-53.  
8. La poeto (tr.) Frigyes Karinthy. *Inlr*,  
sep.-okt., p. 21-23.

9. Verdikto. *Inlr*, jan.-febr., p. 84-89.  
(Var. de n-ro 2.)
- 1961: 10. Arto de la penso. *Belarto* 2, p. 17-18.  
11. Logos. *Belarto* 2, p. 17-18.  
12. La poeto (tr.). Frigyes Karinthy.  
*Belarto* 2, p. 33-34. (Var. de n-ro 8.)
- 1962: 13. Feliĉa amo. *MK* 1, p. 1-5.  
14. La fluidumo de la ĉiovido. *NP* 4, p.  
112-121.  
15. Urania. *MK* 2 (1962-1963), p. 52-54.
- 1963: 16. Honorigo. *MK* 4, p. 115-118.  
17. Péter Illézy. *MK* 3, p. 74-75.
- 1964: 18. Liriko. *MK* 8, p. 115-118.  
19. *Maŝinmondo kaj aliaj noveloj*. Stafeto  
(Beletraj Kajeroj 22), La Laguna. 188p.  
(La noveloj estas „Maŝinmondo”, „Su-  
permilaj noktoj”, „Dokumentoj pri la  
historio de la kompozono”, „Vincen-  
zo”. La lasta estis verkita hungare kaj  
esperantigita de K. Kalocsay.)
20. Perfekta civitano. *33 rakontoj* (Stafe-  
to, La Laguna), p. 233-241. (Rep. de  
n-ro 1.)
- 1965: 21. Genezo. *HV* 2, p. 20.  
22. Julio Baghy. *HV* 4, p. 3-4.  
23. Szentendre, la urbo de la historio kaj  
arto. *HV* 3, p. 20-21.  
24. Tibor Boromisza. *MK* 11, p. 46-47.
- 1966: 25. *Ĉu ankaŭ vi scias?* (tr.). Éva Jani-  
kovszky. Eldonejo Corvina, Budapest.  
40 p.  
26. Dante en la hungara arto. *HV* 4, p. 28.  
27. Danubangulo. *HV* 2, p. 8-9.

28. Du maksimumoj. *MK* 14, p. 129-130.
29. Enciklopeditis. *HV* 4, p. 18-19.
30. Hungara gastronomio. *HV* 2, p. 20-21.
31. Julio Baghy. *Ora Duopo* (Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝto), p. 9-14.
32. Kalocsay-75 jara. *Paco*, junio, p. 10-11.
33. Kion scii pri Hungario por kongresanoj? *HV* 1, p. 2-4.
34. Konfeso pri mia urbo (tr.). Mihály Gergely. *HV* 2, p. 10-11.
35. Liriko. *NP* 1, p. 19-23. (Var. de n-ro 18.)
36. Recenzo: *Esperanto-moderna lingvo*. *HV* 2, p. 27.
37. Trikvarono de jarcento. *HV* 3, p. 2-4. (Var. de n-ro 32.)
- 1967: 38. Anekdotoj pri Attila József. *HV* 4, p. 17.
39. Esperanto estas lingvo de la moderna tekniko. *HV* 2, p. 23-25.
40. La parkmuzeo en Szentendre. *HV* 1, p. 14.
41. Pythagoras. *HV* 3, p. 20-21. (Var. kun titolŝanĝo de n-ro 2.)
42. Recenzo: *Vuk*. *HV* 1, p. 25.
43. Tornistra konkurso (tr.). Lajos H. Barta. *HV* 1, p. 7-8.
- 1968: 44. Budapeŝta ekzameno. *Esperanto en Finnlando*, feb.
45. La cirko (tr.). Frederiko Karinthy. *HV* 2, p. 16-18.
46. Kain kaj Abel. *HV* 4, p. 24-25.



47. Nigraj Okuloj (recenzo de *Okuloj*). *HV* 2, p. 21.
48. Sur bordo de Danubo (sekcio de „Mozaiko pri Julio Baghy”). *HV* 1, p. 11.
49. La Tragedio de l' Homo (kritiko). *HV* 3, p. 18-19.
- 1969: 50. Donna Juana. *HV* 4, p. 18-19.
51. Esperanto kiel lingvo de la moderna tekniko. *SR* 97, p. 52-57. (Var. de n-ro 39.)
52. La kinino. *Esperanto-gazeto*, aprilo.
53. Nia forumo (parto; pri Julio Baghy). *HV* 4, p. 2.
54. Tria preĝo de Pygmalion. *HV* 2, p. 9-11.
- 1970: 55. Centro de Eŭropo. *HV* 1, p. 32.
56. La falsa aŭguro. *HV* 2, p. 25.
57. La guarbo. *NP* 3, p. 168-178.
- 1971: 58. Ŝanoar (tr.). Géza Molnár. *HV* 2, p. 3-5.
- 1972: 59. La barbaro. *NP* 3, p. 177-188.
60. Emba. *HV* 1, p. 10-11.
61. Genezo. *Ŝercoj, rakontoj* (Tankönyvkiadó, Budapest), p. 53-56. (Rep. de n-ro 21.)
62. Kuracistaj historioj. *The British Esperantist*, mar., p. 214-215.
63. Muŝoj. *NP* 2, p. 81-86.
64. La Tragedio de l' Homo (kritiko). *SR* 100, p. 35-40. (Var. de n-ro 49.)
- 1973: 65. Honorigo. *HV* 4, p. 4-6. (Rep. de n-ro 16.)
66. Urania. *HV* 4, p. 7-9. (Rep. de n-ro 15.)

1974. 67. Budapeŝta ekzameno. *Literatura Foiro*, dec., p. 8-14. (Rep. de n-ro 44.)
- 1975: 68. Gratula letero al Kalocsay. *Paco*, hungara eldono, p. 22.
1976. 69. Leciono de historio. *HV* 2, p. 8. (Rep.: fragmento de n-ro 5.)
1979. 70. Vojaĝo al Kazohinio (Romanfragmento.) *Baza literatura krestomatio*, HEA, Budapest. p. 211-217.
1986. 71. Strazniczky, la hungara patro (tr.). György Moldova. *HV* p. 206-208.

DISKO: *La Voĉoj de Sándor Szathmári*. La Voĉalbumo de Esperanto 13-14. Amo-Akademio.

La etiketon „var.” (variante) mi aplikis, kiam ŝajne la koncerna redaktoro disponis manuskripton de Szathmári. En tiuj okazoj okazis pli-malpli gravaj diferencoj inter tekstoj, ekz. n-ro 64 estas konsiderinde pli ampleksa ol n-ro 49, kvankam ankaŭ en n-ro 49 aperas kelkaj vortoj, kiujn oni ne trovas en n-ro 64. La etiketon „rep.” (represo) mi aplikis, kiam la redaktoro ŝajne uzis tekston antaŭe publikigitan, do sen rekta aliro al manuskripto.

#### B. Ĉefaj verkoj pri Szathmári en Esperanto.

- Anon. Prezento de la libro. *Vojaĝo al Kazohinio*, p. 3-4.
- Anon. S. Szathmári 1897-1974 (nekrologo). *Esperanto*, nov. 1974, p. 188.
- Asterisko. Lasta Gulivero foriris. *Literatura Foiro*, dec, 1974. p. 6-7.
- Auld, William. Enkonduko. *Maŝinmondo kaj aliaj noveloj*, p. 7-12.

Káin és Ábel (Kain kaj Abel). *Eszperantó Magazin*  
*Ĝenkönnye* 1974, p. 122-127; *Galaktika*,  
1987. 6a n-ro, p. 47-49.

Kezdetben (Genezo). *Világ és Nyelv Ĝenkönnye*  
1978, p. 202-203.

*Kazohinia* (Vojaĝo al Kazohinio).

Unua eld., sub titolo *Gulliver utazása Kazohi-  
niában*, 1941. Cenzure redaktita.

Dua eld., sub titolo *Utazás Kazohiniában*, 1946.  
Pli plena teksto. Kun klariga postparolo de  
la aŭtoro. Raraĵo.

Tria eld., 1957. Magvető Könyvkiadó. Budapest.  
2 vol., 224 + 268p. 5150 ekz. (Aŭtonomo  
aperis kiel „Szatmári Sándor”).

Kvara eld., 1972. Magvető Könyvkiadó. Buda-  
pest. 389p. 30 000 ekz.

Kvina eld., 1980. Magvető Könyvkiadó, Buda-  
pest, 389 p.

*Tréfán kívül* (hungara traduko de *Kredu min*,  
*Sinjinorino!* de Cezaro Rossetti). 1958.

Ĉ. *Verkoj pri Szathmári en la hungara.*

Benczik Vilmos. Az elfelejtett író (La forgesita  
verkisto). *Science Fiction Tájékoztató*, jul.  
1975, p. 16-31.

Benczik Vilmos. Búcsú Szathmári Sándortól (Adi-  
año al S. Szathmári). *Eszperantó Magazin*,  
1974/11.

Benczik Vilmos. Szathmári Sándor. *Eszperantó*  
*Magazin*, 1973/2.

Farkas Mária. Szathmári Sándor. *Eszperantó Maga-  
zin Ĝenkönnye*, 1974, p. 221-222.

Keresztury Dezső. Utószó (Postparolo). *Gépvilág és*  
*más fantasztikus történetek.*

- Benczik, Vilmos. „Mi ĉiam skribis pri la homo...”:  
 Intervjuo kun Sándor Szathmári. *HV* 1973:  
 4, p. 2-3.
- Benczik, Vilmos: Sándor Szathmári. *Studoj pri  
 la Esperanta Literaturo*, Takasago, 1980. p. 124-130.
- Benczik, Vilmos: Sándor Szathmári 1897-1974  
 (nekrologo). *HV* 1974: 6, p. 29.
- Benczik, Vilmos: Ŝobriga humanismo. *HV* 1970: 4,  
 p. 9-11.
- Duc Goninaz, Michel. Pri la verkaro de Sándor  
 Szathmári. *SR* 95. (1967), p. 40-45
- Kalocsay, K. Pretekste de antaŭparolo. *Vojaĝo al  
 Kazohinio*, p. 5-10.
- Silfer, Giorgio. Pri la stilo de „Maŝinmondo”  
*HV* 1976: 2, p. 25-26.
- Vatré, Henri: La socia romano en Esperanto,  
 Kultura Ĉentro Esperantista, La Sagne,  
 1973, p. 11-14.

C. *Verkoj de Szathmári en la hungara.*

Az asztrálfluidum (La fluidumo de la ĉiovidoj).  
 Tr. V. Benczik. *Galaktika*, 1987. 6a n-ro,  
 p. 40-47.

Az uncinnátus rohama („La atako de uncinnátus”).  
*Világ és Nyelv*, 1987. 5a n-ro.

*Gépvilág és más fantasztikus történetek* (Maŝin-  
 mondo kaj aliaj fantaziaj historioj). Gondolat.  
 Budapest, 1972. 298p. 10 000 ekz.\*

Hamis jós (La falsa aŭguro). *Eszperantó Magazin  
 Évkönyve* 1974, p. 191-193.

\* Ĉi enhavas la sekvajn verkojn: Maŝinmondo, Dokumentoj pri la  
 historio de la kompfono, Honorigo, Genezo, Kain kaj Abel, Perfekta  
 civitano, La falsa aŭguro, Pythagoras, Logos, La guarbo, Superstiĉo,  
 Vincenzo, Muŝoj (en tiu sinsekvo).

- Keresztury Dezső. Utószó (Postparolo). *Kazohinia* (3a eld.).
- Keresztury Dezső. Utószó (Postparolo). *Kazohinia* (4a eld.).
- Kolozsvári Grandpierre, Emil. Gulliver utazása Kazohiniába (recenzo de unua hungarlingva eld. de *Vojaĝo al Kazohinio*). *Nyugat*, 1941, p. 465-466. (Grava recenzo pro prestiĝo de literatura revuo *Nyugat* kaj populareco de la aŭtoro de la recenzo.)
- Kuczka Péter. Szathmári Sándor. *Galaktika* 13, 1975, p. 121.
- Rados, Péter András: Egy magyar író kettős élete avagy Gulliver Eszperanciában („Du vivoj de hungara verkisto aŭ Gulivero en Esperantujo”). Nemere István: *Új titkok könyve*, Magyar Eszperantó Szövetség, Budapest, 1987. p. 215-232.
- Tófalvi, Éva: Az író, mérnök és próféta („La verkisto, inĝeniero kaj profeto”). *Galaktika*, 1987. 6a n-ro, p. 38-39.
- Tófalvi, Éva: A Kazohinia írója („La aŭtoro de Kazohinio”). *Világ és Nyelv*, 1987. 4a n-ro, p. 9.
- D. *Verkoj de Szathmári en la angla*.  
*Kazohinia* (Vojaĝo al Kazohinio). Tr. Inez Kemenes (el la hungara). Corvina Press. S. u., 1975. 373p. (Kun „Postscript” (Postparolo) de Dezső Keresztury, p. 367-373).
- The Perfect Citizen (Perfekta civitano). Tr. Colin H. Hewitt. *The British Esperantist*, nov.-dec.

173. p. 167-171

E. *Recenzoj en Esperanto de verkoj de Szathmári.*

Pri *Vojaĝo al Kazohinio*

Pumpr, Tomas. *Inlr*, jan.-feb. 1960, p. 115-120.

Setälä, Vilho. *Fortoj de l' vivo* (Fondumo Esperanto, Helsinki, 1967), p. 71-72. (Rep. el *Esperanta Finnlando*, 1959.)

Thorsen, Poul. *NP* 1958, p. 235-236.

Pri *Maŝinmondo*

Diego, F. de Teknozoismo. *MK*, aŭtunc 1964. p. 278.

Groth. Morgens. Ĉu kreskdoloro? *NP* 1964:5-6, p. 164.

Konisi Gaku. Homaro kontraŭ tekniko. *Esperanto*, feb. 1965, p. 31-32.

Lesznai, Lajos. *HV* 1965: 2, p. 22.

Kompilis: Karl Pov

## POSTPAROLO

Sándor Szathmári fariĝis esperantisto jam kiel 14-jara knabo en 1911, sed lia nomo fariĝis konata en Esperantujo nur post la apero de lia multe diskutita romano *Vojaĝo al Kazohinio* (1958). Samtempe li fariĝis regula kunlaboranto de pluraj esperantistaj revuoj, kaj en la jaro 1964 per la rakontvolumo *Maŝinmondo kaj aliaj rakontoj* li pruvis, ke la akirita verkista renomo ne estas senbaza.

*Vojaĝo al Kazohinio* estas speciala fenomeno en nia literaturo: la esperantan eldonon anticipis tri eldonoj de la hungarlingva traduko en 1941, 1946 kaj 1957. (Cetere: spite la malan deklaron de la aŭtoro, laŭ filologiaj konsideroj mi emas rigardi originala la hungaran tekston.)

Do, forme Szathmári estas dulingva verkisto, sed lia kulturo, mondrigardo kaj la kvanto de lia esperantlingva verkaro ligas lin al la esperanta literaturo. Cetere, la hungara literaturhistorio emas simple ignori lin, kvankam siatempe Mihály Babits havis tre altan opinion pri la unua hungarlingva eldono de *Vojaĝo al Kazohinio*, kiel atestas liaj tn. „interparol-kajeroj”. (Dum sufiĉe longa tempo antaŭ sia morto li ne plu kapablis paroli, pro grava laringa kancero, kaj komunikis skribe kun siaj geamikoj kaj kunlaborantoj.) Li eĉ volis koncedi al Szathmári la prestiĝan Baumgarten-premion, sed fine li ne kuraĝis fari tion, ĉar „onidire Szathmári estas komunisto.” (La onidiro estis senbaza.)

Tiu onidiro povus glatigi la verkistan karieron de Szathmári post 1945, tamen ne okazis tiel. En 1946 duafoje eliris lia romano, sed la personkulta kulturpolitiko evidente ne povis akcepti ĝin. Nur dek jarojn poste, dum la somera „degelo” li povis subskribi kontrakton por nova eldono de 25 mil ekzempleroj, sed ĝis la printempo de 1957, kiam la libro efektive eliris, tio ŝrumpis ĝis nur 5 miloj.

Poste denove sekvis „silento” por Szathmári, almenaŭ en la hungara lingvo. Nur en 1972 tiu silento finiĝis, jam tro malfrue por li.

La supraj linioj povas konjektigi, ke pro politikaj kaŭzoj la hungara literaturhistorio ignoras lin preskaŭ plene. Tamen, ne estas tiel. Simple temas pri tio, ke la ĝenro, kiun Szathmári kultivis, apenaŭ havas radikojn en la hungara literaturo, kaj tial al la literaturhistoriistoj mankas „skatolo”, en kiu ili povus lokigi lin.

Kiel jam menciite, li akiris verkistan famon per *Vojaĝo al Kazohinio*. Ĝi estas Gulliver-romano, pri-skribanta la vivon de la *Swifta* figuro inter la *hinoj* kaj *behinoj*. (Tiun figuron revivigis ankaŭ la hungara verkisto Frigyes *Karinthy*, kies pensoj tre multe influis la verkaron de Szathmári.) La romano dividiĝas je du partoj: en la unua ni konatiĝas kun la vivo de la perfektaj *hinoj*, en la dua kun tiu de la *behinoj*, en kiuj lastaj – kontraste al la plene raciaj *hinoj* – koncentriĝas ĉiuj atavismoj kaj malnaturajoj de la homa historio.

*Vojaĝo al Kazohinio* estas utopia-filozofia-socia satiro: en la prezento de la mondo de la *hinoj* dominas



la utopia-filozofia, en la priskribo de la *behina* vivo la satira flanko.

Ĝi estas verko pesimisma, eĉ kruela: el la vivoformo de la *hinoj* – kaj la aŭtoro rigardas ĝin la sole ebla perspektiva vivoformo – mankas ĉio, kio por la homo de nia epoko signifas la esencon de la vivo. Sed eĉ por tiu prezo Szathmári ne donas la eblon de saviĝo al la homa gento. La *hinoj* – kvankam ili devenas de homoj similaj al ni – perfektigiĝis ne rezulte de la scienca kaj socia progreso, de altnivela homa agado, sed dank' al ekstera forto, al specialaj radioj. Oni emus etikedi tiun solvon kiel iom eksmodan objektivan idealismon, sed memorante pri kelkaj sciencaj fikcioj kaj eĉ pri certaj sciencaj malkovroj, estas pli prudente rezigni pri tiel kategoria konstato. Tamen, laŭ la prognozo de la verkisto, al la leganto restas nenio alia, ol atendi la bonŝancon esti kuracita per tiuj radioj – do la etike stimula funkcio de la literaturo plene forestas.

Sendube, la pesimismo de Szathmári abunde trovas argumentojn en la lastatempa socia-politika vivo: ni pensu pri la militoj, kiuj ofte malmulte klarigeblas per nure ekonomiaj motivoj, tamen la konsiderinda fazdiferenco inter la evoluinteco de la materia-teknika bazo kaj tiu de la homa konscio ne rajtigas nin tiri tiel sombrajn konkludojn. Dialektika ekzameno de la homa historio (kaj la manko de la dialektika rigardmaniero plej multe deprenas el la valoro de la katene konsekvenca logiko de Szathmári!), se ĝi ne pravas, do almenaŭ lasas eblon de tio, ke la „infana raso” plenkresku per propraj fortoj. Ĉiukaze, ni devas rezigni pri la provoj likvidi la streĉitecon inter la post-

restinta konscio kaj evoluinta tekniko per ignoro al la realo: akcelo de la progreso de niaj pensaro kaj moraro postulas konscian kaj konsekvencan klopodadon *fare de ni*.

La dua parto — priskribo de la *behinoj* — estas tranĉa, senindulga, sprita satiro. Ĝi celas moki la malnaturecon de la homa naturo — fakte ĝi estas brile konstruita kontraŭkapitalisma satiro. Ne hazarde: tiuj malnaturaj kutimoj, moroj, etiko, filozofio ktp., kiujn vipas lia satiro, kaj kiujn li atribuas al la homo kiel biologia estaĵo, plejparte estas naskitaj de la kapitalismo, aŭ de pli fruaj ekspluataj socisistemoj, sendepende de tio, ke multaj el ili postvivas ankaŭ en la socialismo.

Ne mirinde, ke la hungaraj recenzoj trovis la duan parton multe pli sukcesinta, ol la unuan. La prezenton de la *hina* vivo trateksas peza filozofio, kaj la senkoloreco de la temo mem multe deprenas el la vigleco. La fantastiko neniam gajnas memstaran vivon, ĝi havas katalizan rolon, helpas nur la precizan prezenton kaj estas bazo de la satira supereco. Estas tre ĝene — jen la plej grava mallertaĵo de la romano — ke Gullivero en sortdecide gravaj diskutoj argumentas kiel trodresita prusa filistro el la pasinta jarcento, kaj sekve la refuto de liaj konstatoj fare de Zatomon ne estas konvinkaj por la leganto, kiel montris unu el la analizantoj de la verkaro de Szathmári, *M. Duc Goninaz*. En la dua parto la pli multaj ebloj de la temo kaj la alegoria fantastiko faras la verkistan laboron pli sukcesa, kvankam ankaŭ ĉi tie ofte oni sentas stumbletojn, perdiĝon de ekvilibro, tiom karakterizajn por unuaj verkoj.

Koncerne la stilon de la verko, multaj atentigis, ke ĝi ne estas bravaĵo. La romano de Szathmári estas fakte rezonado de atentkatene inteligenta, kelkaspekte genia pensulo.

\* \* \*

La fekunda rakontista periodo — samtempe la dua periodo de lia verkista kariero, ja *Vojaĝo al Kazohinio* verkiĝis fine de la tridekaj jaroj — komenciĝas iom antaŭ la esperantlingva apero de la romano. La plimulto de liaj mallongaj prozaĵoj tiutempe publikiĝis en *Norda Prismo*, *Monda Kulturo* kaj iom poste ankaŭ, en *Hungara Vivo*. Kvar rakontoj — *Maŝinmondo*, *Supermilaj noktoj*, *Dokumentoj pri la historio de la komposono* kaj *Vincenzo* — aperis en la volumo *Maŝinmondo kaj aliaj rakontoj*. Kvankam la nivelo de tiuj ĉi verkoj ondas, tamen konstateblas signifa evoluo kompare al la romano.

Nekontestesteble unu el la plej gravaj pecoj estas la 74-paĝa *Maŝinmondo*, kiu povas servi kiel modelo de filozofia scienca fikcio. *Vojaĝo al Kazohinio* estas filozofia romano, iranta la vojon de *Voltaire* kaj *Swift*, dum en *Maŝinmondo* ni renkontas aŭtentikan sciencan fikcion, malgraŭ la filozofia karaktero de ĝia problemaro.

Dum ĝia legado tuj leviĝas la penso, ke Szathmári ĉi tie revizias siajn ideojn, eksplikitajn en *Vojaĝo al Kazohinio*. Tamen ne estas tiel: en la romano li prezentas la biologie altkvalitan kaj pro tio sen-kontraŭdiran vivon de la *hinoj*, dum ĉi tie li eliras el la normala tera vivo. Li konkludas, ke la kontraŭdiroj fine kon-

dukas al la plena neniĝo de la vivo — restos sur la Tero nur la raciaj, konsekvencaj maŝinoj.

Sendube, en tiu ĉi rakonto ni renkontas konfuzon de la naturaj movoformoj kun la sociaj, krome, denove ni spertas, kiagrade la aŭtoro neglektas dialektikon. Filozofian refuton al la argumentado de Szathmári oni trovas en iu ajn filozofia manlibro, sed fakte oni ne legas beletran verkon kun la celo lerni filozofion. La ĉefa instruo de la rakonto — kvankam tio ne nepre koincidas kun la aŭtora intenco — estas admono: kio atendas nin, se aplikante la rezultojn de la scienco kaj tekniko ni forgesas pri la prudento kaj por celoj esence duarangaj — ekz. militaj — ni ellasos la direktilon el niaj manoj. Kaj la fakto, ke malgraŭ la grandega arsenalo de perfektegaj nukleaj armiloj dum jam kvardek jaroj ni sukcesis eviti la katastrofon, donas ne malesperigan programon.

Per *Maŝinmondo* la aŭtoro pretigis novan ilustraĵon por sia filozofia tezo, nome, ke la homoj — por eviti katastrofon — devus laŭeble alsimiliĝi al la maŝinoj. La rezultato tamen estas multe pli ol tio: ĝi estas aprezinda ankaŭ kiel literatura verko, precipe la stilo estas preskaŭ bravaĵo. Forestas jam la mallertaĵoj, stumbloj, tiom oftaj en la romano: *Maŝinmondo* multrilate estas elpintiĝo de la verkaro de Szathmári, kaj apartenas al la kremo de la esperanta literaturo.

Alia — malpli sukcesa ol la titoldona rakonto — scienca fikcio en la *Maŝinmondo kaj aliaj rakontoj* estas *Dokumentoj pri la historio de la kompozono*. La kompozono (komponmaŝino, intertempe jam realiĝinta inventaĵo) renversas la ordon de la muzika mondo. La rakonto estas ne pli ol apliko de la baza tezo

de Szathmári sur la kampo de la estetiko. Li provas la internan kontraŭdirecon de la nocio *estetikeco*: en la ĉiuvidpunkte perfekta muziko, komponita de la kompozono, la homoj ne trovas estetikecon, ĉar ĝi estas maŝina produktaĵo. La rakonto – precipe kompare al *Maŝinmondo* – estas iom anemia: konatiginte kun la baza situacio, la leganto rapide divenas ĉion okazontan, inkluzive ankaŭ la konkludojn de la aŭtoro. Pli sprita estas la priliteratura satiro *Liriko*, kiu mokas la ekscentraĵojn de la moderna poezio.

Bonege sukcesinta satiro estas *Supermilaj noktoj*, kiu kun egala akreco atakas la kruelan potencon kaj la ŝafan paciencon, stultan kredemon de la subpremitoj. Interese: du nomoj ŝajne estas parolaj en la hungara lingvo. *Kabd-el-Hammar* (kapd el hamar) – „kaptu rapide”, *Kajah-al-Mah* (kaja alma) – nutraĵo mankas (ĵargone).

Ni devas aparte mencii la pseŭdohistorian rakonton *Vincenzo*, kiu estas eble la plej artisma verko de Szathmári. Ĝi estas rakonto verkita en varma, homa tono, kun klasike bela konstruo. Bedaŭrinde pro *Maŝinmondo* ĝi estas preteratentita, la kritiko ne rimarkis, ke en la vivo de *Galilei* kaj lia frato, Szathmári konfesas pri si mem: ne estas malfacile rekoni en la verama, rektaspina – kvankam foje-foje erarvaginta – Galileo Galilei mem la aŭtoron. Tiu ĉi rakonto donas ŝlosilon al lia pesimismo: Szathmári ne estas malica predikanto de la mondkatastrofo kun Mefista pozo, sed kreanto, plene konscia pri la socia respondecado de la arto: vane insistas Vincenzo, ke la fido de Galilei en la favora juĝo de la postepoko estas naiva, tamen lia fido estis ĝusta, la postepoko admiras

kaj *utiligas* lian verkon, dum „*la historio nenion scias pri tio, ke Galileo Galilei entute havis fraton nomatan Vincenzo.*” La firma optimismo de tiuj kelkaj vortoj ĵetas absolute novan prilumon al la tuta verkaro, ja Szathmári apelacias ĉi tie al la homoj de la estonto, kiujn li mortkondamnis en *Maŝinmondo*.

Revene al la karakterize „Szathmári-ecaj” rakontoj, ni haltu iomete ĉe *Honorigo*, kiu estas fakte la sola t.n. negativa utopio de la aŭtoro. Per sia etoso ĝi parencas al la romano de la hungara poeto kaj verkisto Mihály Babits: *Elza pilóta* („Pilotino Elza”), kaj, kompreneble al la *The brave new world* („La brava nova mondo”) de *Huxley*. Aperas en ĝi ĉefe la precizege aplikita satiro kontraŭ la defremdiĝinta socio, en kiu dank’ al la multe evoluinta scienco kaj tekniko la ŝtata potenco fariĝas senlima: la individua vivo de la homoj malebliĝis. Oni ne bezonas multe rompi la kapon por konstati, ke la reala fonto de tiu ĉi rakonto estas la sociaj cirkonstancoj kaj politika klimato de la t.n. personkulto, esence ties hungara varianto, ĉar Szathmári ne havis senperajn spertojn el aliaj landoj. Sed ne tiu estis la sola fonto: la alte evoluinta tekniko vole-nevole memorigas la legantojn pri Usono – ja tiel aspektus ia hipermoderna faŝismo tie aŭ en alia teknike avangarda lando.

Estas interese, ke Szathmári en tiu ĉi rakonto – male al siaj bazaj tezoj – montras altan respekton al la „neraciaj” homaj ecoj: li simpatias kun la gemantoj, kiuj fakte praktikas „behinaĵojn”.

Per tiu ĉi verko fakte elĉerpiĝis la rakontoj kun sciencfikcia karaktero, ne kalkulante la iom grize didaktikan *Urania* kaj la amare farsecan *Donna Juana*.

En la lasta periodo de sia verkista kariero Szathmári forlasis tiun ĉi formon, kiu pli frue ebligis al li grandan liberecon en la eksplikado de liaj ideoj, sed meze de la sesdekaj jaroj ĝi jam estis iom tro diluita. Szathmári ĉiam protestis, se oni volis klasifiki lin kiel sciencfikciiston, li timis esti metita en tiun ne prestiĝan skatolon de la literaturo.

Revenante el la estonto li turnis sin al la homa historio, sed, kompreneble, malgraŭ ĉiuj precizemaj notoj, kiujn li aldonis al kelkaj rakontoj, oni facile rekonas, ke temas pri pseŭdohistoriaj verkoj. Li verkas fakte „apokrifojn”, kiel *Ĉapek*, kvankam li ekkonis tiun verkon de la ĉeĥa klasikulo nur en la jaro 1973, kiam la aŭtoro de tiu ĉi postparolo pruntis al li la volumeton (en la hungara lingvo). En liaj „apokrifoj” – kun diferencaj dozoj – miksiĝas filozofio, satireco kaj humuro. En *Genezo* evidente dominas la intenco ridigi, en *Superstiĉo* la satiro kun sordinita humuro, en *Logos* certa malkomplika filozofio. Kelkaj el tiuj rakontoj estas eble iom longemaj, sed troviĝas inter ili ankaŭ majstre verkitaj trafaj pecoj, kiel *La falsa aŭguro* aŭ *Kain kaj Abel*. En la ĉi lastaj verkoj li sukcese evitis la kaptilon de la troa didaktikeco, tamen eĉ por la plej naiva leganto la aŭtora intenco estas tute evidenta.

En *La barbaro* Szathmári reverkas sian ŝatatan ideon pri la relativeco de la normoj, kaj legante tiun ĉi rakonton – cetere tute ne perfektan – oni kontente notas, kiom maturiĝis ideo nia literaturo depost *Luyken*. En *Stranga heredaĵo* la germana-brita aŭtoro ankoraŭ nomas naŭzaĵo la aztekan riton: li montras nenian paciencon aŭ toleremon por aliaj kulturoj, kaj

eĉ ne venas en lian kapon pensi pri la kruelaĵoj, kiujn faris *Cortés*.

Formas interesan parton de la verkaro de Szathmári la noveloj pri virinoj. Tiuj pecoj montras klare, ke la „lasta Gulivero” ne taksis tre alte la pli belan duonon de la homaro. En *Mistika profundo* kaj *Tria preĝo de Pygmalion* li prezentas ilin karikature, en *Du maksimumoj* al tio aldoniĝas iom da amaro, ĝis en *Feliĉa amo* li rekte konfesas, ke virinoj en li povas vekti daŭre nur unu senton: tiun de enuo.

Pli atentindaj ol la privirinaj malicaĵoj estas kelkaj sociaj satiroj, kiuj havas nenian ŝildon, nek sciencfikcian, nek pseŭdohistorian, nek fabelecan (kiel *Perfekta civitano*, el kiu cetere estis komponita mallonga opero, kiun dissendis la hungara televido). Temas pri la jam menciita *Liriko* kaj *La fluidumo de la ĉiovido*. En tiuj ĉi verkoj Szathmári rezignas pri sia konstanta strebado al totaleco, el lia verkanta mano malaperas la kelkfoje sentebla spasma, kaj disvolvante la historion libere, sen premo de gravaj direndaĵoj, li mokas fenomenojn kiujn li malŝatas (*Liriko*), aŭ simple nur ĝuas la ridigajn situaciojn, kreitajn de li mem. Ankaŭ en *La fluidumo de la ĉiovido* aperas motivoj, ĉerpitaj el la „trezorejo” de la personkulto: fantomoj devas promesi dekprocentan superplenumon por la honoro de la fantomkongreso: homoj akceptas la nokte vizitantan fantomon per la timaj vortoj „kion vi deziras, kamarada moŝto?”, sed kiam ili konstatas, ke temas nur pri fantomo, ili ĉesas timi, ktp.

Szathmári postlasis gravan verkaron, iasence la plej gravan en nia originala prozo: Tiu ĉi verkaro mult-



rilate ne estas senriproĉa, ja sendube Szathmári ne estis lerta metiisto de la plumo: lia historiotekso preskaŭ ĉiam estas unulinia. li ne kapablas krei intrigojn, kaj ankaŭ lia stilo vere malofte atingas sekvidandan alton. Unu afero tamen estas certa: la pensaro de liaj verkoj admirinde harmonias kun la celado de la lingvo en kiu li verkis, ili elspiras varman deziron por mondo pli *racia*, kiu garantios por la homaro longan vivon sur tiu ĉi terglobo.

\* \* \*

Hungara Esperanto-Asocio en 1977 eldonis jam kolekton de la noveloj de Szathmári sub la titolo *Kain kaj Abel*. Tiu volumo enhavis 23 pecojn: nun aldoniĝas pliaj kvar verkoj, kies amplekso preskaŭ egalas al tiu de la ceteraj 23. Temas pri *Maŝinmondo*, *Supermilaj noktoj*, *Dokumentoj pri la historio de la kompozono kaj Vincenzo*. Tiuj kvar rakontoj aperis en la volumo *Maŝinmondo kaj aliaj rakontoj*, kiun eldonis Stafeto en la jaro 1964.

Oni povas diri, ke la nuna volumo estas la *plena novelaro* de Szathmári, ĉar ĝi enhavas ĉiujn liajn retrovitajn iom signifajn beletrajn verkojn. Estis tute ekskluditaj tradukoj, sciencaj verkoj kaj artikoloj. El la originalaj beletraĵoj ne aperas ĉi tie nur kelkaj senpretendaj krokizoj, kies temon li priverkis en aliaj noveloj pli lerte, kaj unu humuraĵo, komprenebla nur por hungaroj.

Szathmári postlasis nur malmultajn manuskriptojn, sekve ĉi tie ni reproduktas tekstojn aperintajn en diversaj revuoj. Kiam iu verko presiĝis plurloke,

kaj la tekstoj malsimilis, ni klopodis elekti tiun varianton, kiu ŝajnis porti malplej multe da redaktoraj korektoj. Tiu principo estis aplikita ankaŭ por la kolekto *Kain kaj Abel*: el tiu libro ni prenas la tekstojn de 23 noveloj, tamen korektinte la preserarojn.

Fari aŭtentikan kronologion de lia verkaro ŝajnis tasko malebla. Szathmári plurfoje retajpis siajn novelojn por dissendi la kopiojn al diversaj redakcioj, sed sur ĉiu retajpaĝo aperas la dato de la koncerna tajpado, ne tiu de la elverko. Estas nenia pruvo, ĉu iu el la ekzempleroj devenas el la unua tajpaĝo, kiu evidente devas surporti la daton de la elverko. Pro tio, la jaro skribita fine de ĉiu verko, estas tiu de la unua apero. Ĉe *Pythagoras*, kies unua parto aperis sub titolo *Verdikto* en 1957, mankas dato, ĉar ne estas certe, ke la tuta verko pretis jam tiam. *Mistika profundo* laŭ indiko sur la manuskripto estis verkita en 1965, tamen, kiel supre estas eksplikite, ĝi povis verkiĝi pli frue. *Superstiĉo* estis preta plej malfrue en 1972, tamen, sub la ĉi lastaj verkoj mankas jarindiko, pro la fakto, ke ili aperis la unuan fojon en *Kain kaj Abel*.

Ĉe la starigo de la vicordo de la noveloj kiel elirpunkton ni uzis la solan hungarlingvan novelaron de Szathmári, aperintan en 1972. Ĝi enhavas dek tri pecojn, en sinsekvo difinita de la aŭtoro. Ŝajnis plej prudente tiujn dek tri verkojn aperigi ankaŭ ĉi tie en la sama sinsekvo; la ceteraj sekvas en kronologia ordo. Tiu maniero kaŭzis dilemon nur en kazo de *Mistika profundo*: ĝi estis envicigita laŭ la jarindiko sur la manuskripto.

Ni represas ĉi tie la aŭtobiografieton, kiun li verkis je la peto de Juan *Régulo Pérez* por la volumo *Maŝinmondo kaj aliaj rakontoj*.

Ni represas ĉi tie la autobiografion, kiun li verkis je la peto de Juan *Régulo Pérez* por la volumo *Maŝinmondo kaj aliaj rakontoj*. Same ni reaperigas la bibliografion de Karl *Pov*, kun ioma refreŝigo.

Vilmos *Benczik*